Enhavo

Pri la estonteco de <i>Senlime</i>	p. 2
Nia agendo	p. 3
Montpelier-aj ekskursoj	p. 4
Kiom belas nia regiono	p. 5

Responsa eldoninto : Jean-Marie Jacques
Pl. Verte 23 bte 4
B - 4800 VERVIERS
Belgio.

La membro-kotizo koncernas la civilan jaron : ekde
nun ni ricevas la pagojn por 1999. La paganto klare
indiku la celon de la pago, *ekzemple*:
membro-kotizo Senlime 1999 por S-ro XXXXXXXX.

PRI LA ESTONTECO DE *Senlime*

Notre association *Senlime* repose essentiellement sur quatre piliers:

- ce bulletin d'information
- les rencontres des trois pays
- les réunions à La Calamine
- l'amitié entre les membres.

Il faudrait absolument

- mettre sur pied à l'avance un programme de réunions à dates fixes pour La Calamine
- soutenir ce bulletin (à l'aide !).



Komitatanoj ne forgesu :

venontan komitat-kunsidon la 25an de oktobro.

Venu kun ideoj : kiel vivteni nian aferon?

Ni ne devas malkasxi al ni, ke nur kvar praktikaj realigoj fortikigas la asocion *Senlime* : tiu-cxi inform-bulteno, la komunaj kunvenoj en Kelmis, la Trilandaj Renkont-igxoj kaj la amikeco inter la membroj kaj komitatanoj.

Mi ne tro timas koncerne la trilandajn renkontigxojn, malgraŭ la mankanta "numero" cxi-aŭtuna. Estus ja diable terure se ni ne sukcesus starigi etan renkontigxon dufoje en la jaro, en nia Eùregiono.

Sed cxu suficxus du renkontigxo por subteni la sxanceligxeman intereson de "esperantantoj" (ni ne parolu pri la duonfanatikaj esperantistoj, kiuj fakte konsistigas ve malaperantan specion)?

Ni nepre devas pluorganizi ion kroman. Cxar jam malaperis la prelegoj en Verviers (Eupen, Baelen, Welkenraedt, Soumagne, ...), ni felicxe (re) trovis Kelmis-on. Plej urgxas, ke gxi regule funkciu. Tiucele, antaŭa pretigado de komuna programo certe estas nun nepre realigenda etapo.

Pri la informilo, mi zorgadas. Sed gxi ne povos pludaŭri se la aliaj kolonoj de nia asocio malaperas aŭ tute malfunkcias.

Kvankam mi estas supersxutata da laboro (profesie, mi estras Verviersan lernejon por 160 mensaj handikapituloj, imagu...), mi volonte daŭrigos la aperon de tiu-cxi informilo, kondicxe ke mi ricevu helpon.

Mi kompreneble, kiel mi jam skribis, unue devas koni la liston

de la membroj kaj la oficialajn informojn. Tio dependas nur de la komitatanoj de *Senlime*.

Due, mi bezonus okazan helpon de "amatoraj" gazetistoj, kapablaj foje-foje verki artikoleon (maksimume unu etan pagxon) pri iu temo, kiu iele rilatus al la esperantista agado en Eùregiono Mozo-Rejno.

Tiuj artikoloj (kiel nuntempe decas ecx por amato) nepre estu tajpitaj per moderna teksto-prilaborilo (tajpu mem aŭ trovu amikon, kiu...). Tiun-cxi informilon mi eldonas per MS-Publisher 97, kiu kapablas legi kaj pri-labori tekstojn, verkitajn laŭ internaciaj normoj (atentu pri supersignoj, k.t. p.!) **per jenaj programoj** :

- Publisher
- Teksto sola (DOS)
- Rich Text Format
- Word 2.x por Windows
- Word 6.0/95 por Windows / Macintosh
- Works 3.0 por Windows
- Works 4.0 por Windows
- WordPerfect 5.x
- WordPerfect 6.x
- Windows Write.

Viaj kunlaborajxo povas esti senditaj al mi sur disketo aŭ per la reto. Mi kompreneble ankaŭ *eventuale* povas reuzi nigre-blanke viajn bildojn en konatajn formatojn (.gif, .jpg).

Nenial sendu al mi fotokopiendan aŭ tajpendan artikolon, nek tekston sen rilato kun *Senlime* (ekzistas aliaj pli dikaj revuoj) !

E S enlime p e r a n t o

Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon, helpe de la internacia lignvo esperanto, precipe en la Eùregiono Mozo-Rejno, **Senlime** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eùregiono. Ĝi povas enhavi la programerojn de la lokaj grupoj.

Rappel / rememorigo:

Paĝoj / Pages **E.G.V.-Senlime**
 ĉe / sur **Internet:**
<http://www.ping.be/jmjsenlime/>

Inf.: J.-M. JACQUES
 (xx 32 87/33.02.92
 : jmjsenlime@ping.be

Eùregiona kalendaro 1998/99 (1)

Merkredon, la 14an de oktobro 1998 - 20h00 - Arnhem (NL):

esperantistoj kaj ne-esperantistoj ensxipigxos al 8-taga krozado (Arnhem - Gorinchem - Antverpeno - Middelburg - Willemstad - Gouda - Wijk bij Duurstede - Arnhem).

Elsxipigxo en Arnhem cxirkaŭ la 13h00 la 21an de oktobro 1998.

Specialaj (ne-devigaj) arangxo por esperantistoj.

Inf. Peter PARREN:

(xx 31 43 4 55 14 36.

N-B: S-ro PARREN sercxas esperantistojn, ne nur por partopreni la sxipadon, sed ankaŭ por gvidi kaj/au amuzigi la partoprenantojn en la vizitotaj urboj. Antaŭan dankon al cxiu bonvolema helpanto.

Vendredon, la 23an de oktobro 1998 - 20h00 - Kelmis (B):

komuna grupvespero de **Senlime** (prelego de J.-M. JACQUES pri **Montpelieraj ekskursoj**: prelego pri la regiono cxirkauanta Montpellier, kun belaj lumbildoj).

Ejo: salono 8 en SELECT.

Inf. J.-M. JACQUES:

(xx-32-87 / 33.02.92.

Vendredon, la 27an de novembro 1998 - 20h00 - Kelmis (B):

komuna grupvespero de **Senlime** (prelego de S-ro Raymond DEMARCHE pri **"Kiel belas nia regiono"**: prelego pri la regiono cxirkauanta Verviers-on, kun belaj nekutimaj lumbildoj).

Ejo: salono 8 en SELECT.

Inf. Raymond DEMARCHE:

(xx-32-87 / 22.68.18.

N-B: la temo do ne estos la landeto

Bhutano, kiel iam antaŭe anoncite.

Sabaton, la 12an de decembro 1998 - 18h00 - granda salono en Select, Kelmis (B):

dua Trilanda Zamenhof-festo de Senlime.

Inf. Trude SINNO:

tel. (xx 31 4330/62015.

*** Januaro - februaro 1999:**

vintra paŭzo (pro la vintraj veterkondicxoj, ni ne kunvenos en Kelmis).

Dimanxon, la 21an de marto 1999 - 9h00 - Stolberg (D):

Trilanda Renkontigxo.

Inf. Klaus HOGEN:

(xx 49 2406 7809.

31 julio - 7 aŭgusto: 84-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en BERLINO

Inf. Marcel DELFORGE:

(xx-32-71 / 43.14.13.

!

Pro eblaj programsxangxo, prefere telefonu cxe la menciita persono antaŭ ol partopreni aktivajxon.

Prelego en Kelmis, la 23an de oktobro (20a h.) :

“Montpelieraj ekskursoj”

Jean-Marie Jacques

Espéranto on line

En août dernier, quelque 3000 espérantistes venant de 70 pays ont participé au congrès de l'Universala Esperanto Asocio qui se tenait à Montpellier. Pour tout savoir sur ce rassemblement et sur l'activité des adeptes de la langue internationale du docteur Zamenhof, branchez-vous sur

<http://www.esperanto.net>

ou

<http://www.esperanto-usa.org>



Le 23 octobre à 20 heures, au “*Select*” à La Calamine, J.-M. Jacques donnera une conférence en espéranto sur le thème :

“Excursions de Montpellier”

Avec le collaboration du Ministère de la Communauté française.

Jean-Marie Jacques restadis dum pluraj semajnoj en la regiono de Langvedoko-Rusiljono, kaj fine partoprenis la Universalan Kongreson en Montpeliero.

Post kelkaj lumbildoj pri la kongresejo, ek al unua ekskurso duontaga, en Aubais, vilagxo 35 km nord-oriente de Montpeliero, kie okazis la cxiujara festo de mondcivitanoj.

Tiam J.-M. Jacques invitos vin akompani lin “De Cevenoj gxis Mediteraneo tra Langvedoko”.

La deirpunkto estos la monto Aigoual aù Aigualis (pluvema), de kie cxe bona vetero videblas la Pireneaj, Cevenaj kaj Kantalaj montoj, la Ventuo kaj la Alpoj (gxis la Blanka Monto kaj la Maladetta), la Langvedoka ebenajxo, la Mediteraneo...

Tra la turisma urbeto Meyrueis, vi aliros la pentrandan Cevenan “Kornicxo”n, vojon konstruitan, laùlonge de montara kresto, de la regxo Ludoviko la 14a, komence de la 18a jarcento, por ebligi armean lukton kontraù protestantoj.

Fine de tiu kornicxo, en St. Johano-Garda, vi admiros la belegajn multkolorajn marfisojn vivantajn en la akvarioj de la Atlantida Parko. Pri la sorto de la persekutitaj protest-antoj rakontas “muzeo de la dezerto”, kiun vi vizitos.

Per la TCV (trajno vapora de la Cevenoj), vi atingos Prafrance kaj gxian surprizan bambu-ejon. Pro speciala mikroklimato, tiu 40-hektara parko rixas je diversaj ekzotikaj arboj (sekvojoj, tuliparboj, ginkoj, palmoj).

Survoje al Nimes, la prelegonto montros al vi etan provencan vilagxon kiun li aparte sxatis : Castiljono Garda, de kie videblas la fama ponto de l’Gard.

Tiun preskaù tro famkonatan romian postrestajxon ni evitos kaj preferos viziti unu el la multnombraj sed malbone konataj romiaj ejoj : Ambrussum, iama urbo kie oni ankoraù nun povas laùiri perfekte konservitan romian vojon.

Tiam nia rondo kondukos nin al la urbo Montpeliero, kun kiu eblas konatigxi per trajneto surstrata. Ni preterpasos kelkajn vidindajxojn de la malnova parto de la urbo kaj de la moderna Antigona kvartalo, fama pro sia novklasikisma stilo.

Poste ni nepre ekiru al la Montpelier-a strando en Palavas-la-ondo, kie estis planita rok-koncerto de esperanto-kantanta grupo, por gejunuloj de 10 gxis 100 jaroj.

Fine, daùrigante nian vojon laù la marbordo, ni atingos Seton por admiri la belegajn panoramojn de la monto St. Kler al la urbo kaj haveno, la lago Thau, la Cevenoj, ankaù gxis Agde (kaj ... kiam belveteras... al la Pireneoj proksimaj).

Por ne iluziigi iujn ajn, mi klare rememorigas ke, kvankam ni vidos kelkajn lumbildojn el Montpeliero kaj la kongresejo, la temo de tiu-cxi prelego ne estos la kongreso mem, sed ja dumaj ekskursoj.

Per proksimume 150 lumbildoj ni esperas iom revarmigi vin per lastaj sudaj sunbriloj, antaù la tiam baldaù ekkomencigxonta vintro...

Prelego en Kelmis, la 27an de novembro (20a h.) :

“Kiom belas nia regiono”

Raymond Demarche

La 17an de marto 1993, post la dissplitigo de flanka vitro de lia aŭtomobilo, oni sxtelis de Raymond DEMARCHE lumbildojn pri lia regiono, kiujn li projekciis nur kvin fojojn ! Kiamaniere ilin poste uzis la malkuragxa enviulo, kiu faris tiun enrompon ?

Post tiu misaventuro, la turisma raportisto pacience refotis, ecx plibele, sian aron da perditaj bildoj.

La gespektontoj vagos cxirkaŭ Verviers : interalie inter Herve, la abat-ejon en Val-Dieu, la placon en Clermont, la monteton de la Tri limsxtonoj, la florumatan irantaron en Hergenrath, la kastelon en Raeren.

La natursxtatantoj estos kontentegaj,... ecx miregitaj.

Raymond DEMARCHE projekcios dum tiu kunsido centkelkon da altkvalitaj kolorlumbildoj. Vi nepre ne bedaŭros vian veturadon al Kelmis. Ja estas certeco.



Inter la Verviers-aj vidindajxoj trovigxas la urbo-domo.

Kial ne profiti el la prelego de Raymond DEMARCHE por viziti la regionon?

Post nokto en hotelo “Amigo” aŭ cxe (esperantista) amiko, kial ne viziti la urbon ? La turisma domo (strato Xhavee, apud la stacidomo) eldonis esperantlingvan brosxureton pri Verviers.

En gxi vi malkovros belan promenadon tra la stratoj kaj agrablaj cxirkaŭaj padoj. En la centro, amaso da magazenoj kaj restoracioj pasigos al vi agrablan momenton.

Posttagmeze aŭ dimancxe, la cxirkaŭa regiono kun la lagoj (La Gileppe, Eupen, Spa-Warfaz, Robertville, Butgenbach), la Altaj Marcxoj (Fagnes),... atendas vin.

Ne forgesu viajn botojn se vi deziras iri al la Marcxoj (“Baraque Michel”,...), sed ne timu : la loko estas cxiam vizitebla.

Informojn vi ankaŭ certe trovos en Kelmis, dum kaj post la prelego de Raymond DEMARCHE.

Kelmis ne estas vespere atingebla per la aŭtobusoj aŭ trajnoj. Tamen, krom la eblecoj de pasporta servo, vi facile povus agrable logxigi vin en Liegxo, Akeno,...

En Vervierso estas almenaŭ du suficxe bonaj hoteloj :

- **Amigo** (str. Herla 1, tel. xx.32/0-87/ 22.11.21) en la cxirkaŭurbo,
- **Hôtel des Ardennes** (pl. de la Victoire 15, tel. xx.32/0-87/22.39.25) apud la stacidomo.

Bonan restadon en nia Eùregiono !

Le 27 novembre à 20 heures, au “*Select*” à La Calamine, R. Demarche, conférencier agréé par le Service des Affaires Culturelles de la Province de Liège, donnera une conférence en espéranto sur le thème :

“Quelle belle région que la nôtre”.

Avec la collaboration du Ministère de la Communauté française.

Verviersa
Esperanto-Grupo
Cotisations

Les belges habitant l'Eurégion peuvent virer les cotisations suivantes au compte n°

000-0245571-64

de: Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

APE 1998-99	400 BEF
UEA 1998	1900 BEF
SENLIME 99	370 BEF

Senlime

— Senlime : Membro-identigilo

Senlime en Montpeliero

La fotajxo montras la aviadilon speciale luprenitan de nia asocio por transporti siajn multnombrajn membrojn al la kongreso Montpeliera, precize kiam gxi forlasis la flughavenon de Frejorgues kaj suprenflugis la urbon.

Pro manko da pilotoj, la flugkompanio permesis al ni ankaŭ uzi nian propran piloton.



Ni do sercxis volontulon, kaj finfine estas denove Jean-Marie Jacques, kiu kuragxe kaj ne flankigxante stiris la aparaton. Felicxe li sukcesis

alterigxi kaj en Montpeliero kaj en Bruselo.

La fakto estas sufcixe malofta por esti substrekita.

Fakte, ja temas pri la urbo Montpellier kaj la piloto ja estas via amiko Jean-Marie, sed la foto felicxe estas ekrana kopio farita per komputilo dank'al la fama flugsimulilo de la firmao Microsoft ("MS-Flight Simulator for Windows 95").

N'oubliez pas notre site Internet (même si vous n'êtes pas branché, vous pouvez le visiter dans un cybercafé, un centre culturel, chez un copain,...).

Merci de votre visite !

<http://www.galaxycorp.com/JMJacques>

Aŭtuno
1998

(4)

oktobro
novembro
decembro

Senlime

Oficiala informilo de la komitatanoj al la membraro de
Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno



kaj

Verviersa Esperanto - Grupo

PERIODA^O
PERIODIQUE

Informations en **français** /
Informoj en la **franca**:
(xx-32-87-330292
: JMJacques@galaxycorp.com
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
B-4800 VERVIERS

Informatie in het **Nederlands** /
Informoj en la **nederlanda**:
(xx-31-43-3062015
: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45,
NL-6291 VN VAALS

Informationen auf **deutsch** /
Informoj en la **germana**:
(xx-49-2406-7809
: Hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str.
34 D-52134
HERZOGENRATH

Kotizo kaj abono al "Senlime"

10 Eŭroj (aŭ egalvaloro):

Belgio 370 BEF
Konto n-ro: **000-0245571-64** de
Esperanto-Grupo, r. Donckier 22,
B-4800 VERVIERS

Nederlando 20 NLG
Konto n-ro: **5789437**
de **Marnoland-grupo** (hr. n.g.m.
Hoen), NL-6181 BG ELSLOO

Germanio 18 DEM
Konto n-ro: **6623201**
bankkodo **390 500 00** de **Senlime**
(Monika Hogen), Im Pesch 20,
D-52134 HERZOGENRATH

Informilo eldonita de la
Verviersa Esperanto-Grupo
kun la subteno de la Belga
Ministerio de la Franclingva
Komunumo.

Senlime, Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno,
invitas vin al la
Trilanda Renkontiĝo en Stolberg (D)

dimanĉon, la 21an de marto 1999

Provizora programo : prelegoj de S-ino DRECKMEYER
kaj S-ro Yves PERAUT (SAT-ano), vizito de muzeo,
film-prezentado, ĝenerala asembleo de *Senlime*,...
Pliaj informoj (prezoj, aliĝo,...) en nia printempa

Enhavo

Pri la estonteco de *Senlime* p. 2

Nia agendo p. 3

Zamenhof-festo p. 4

Novajoj de la komitato p. 5

Responso eldoninto : Jean-Marie Jacques
Pl. Verte 23 bte 4
B - 4800 VERVIERS
Belgio.

La membro-kotizo koncernas la civilan jaron : ekde
nun ni ricevas la pagojn por 1999. La paganto klare
indiku la celon de la pago, *ekzemple*:
membro-kotizo Senlime 1999 por S-ro XXXXXXXX.

Dans notre précédent numéro, je faisais une description, certes un peu sombre mais réaliste, de la situation actuelle de notre association.

L'avenir de *Senlime* est peut-être pourtant bien plus prometteur que celui du reste du mouvement espérantiste.

Senlime ne serait-il pas le premier des groupes espérantistes d'une nouvelle génération, dont le siège serait volontairement, non pas une ville unilingue, mais une région multilingue ?

Ces groupes seraient fédérés (comme les états au niveau européen) et connectés par Internet, formant enfin une véritable association mondiale, sinon



Komitatanoj ne forgesu :
venontan komitat-kunsidon
la 28an de februaro.

Pripensu la venonta(j)n
Trilanda(j)n Renkontigxo

PRI LA ESTONTECO DE *Senlime* (2)

Tiu-cxi artikolo spegulas nur opinion de la aŭtoro, sed ne nepre de la tuta komitato.

Mia antaŭa artikolo pri la sama temo ne vekis multajn reagojn. Jes ja, kion aldoni ? Du personoj tamen proponis sian helpon por tiu-cxi informilo (kio ne estas nia asocio), kaj mi dankas ilin.

Tamen la problemo restas pripensenda. *Senlime*, laux mi, devus esti unu el tiuj nov-tipaj esperanto-grupoj, ne sidantaj en unulingva urbo, sed intence starigitaj en plurlingvaj regionoj.

Nia agad-rondo estas la Euxregiono Mozo-Rejno, trilingva. Sed ni scias, ke ekzistas aliaj Eùregionoj, ankaux du- aux plur-lingvaj. Mi sxatus se tie kreigxus ankaux senlimaj asocioj (*Senlime2*, *Senlime3*,...) kunlaborantaj kun ni, ecx fondante federacion da tiaj novtipaj esperanto-grupoj.

Kompreneble, esperantistoj devus forlasi sian hejmurbon, kaj veturi kelkajn kilometrojn por renkontigxi kun alilingvaj esperantistoj (ne havas sencon, ke Verviersaj esperantistoj, cxiuj franclingvaj, interparolu per alia lingvo...).

Kompreneble ankaux, tio metus (metos ?) multajn organizajn problemojn... sed niaepoke, kiam regas auxtovojoj kaj retaj komunikoj, cxu ili estas nesolveblaj?

La entreprenoj, antaŭ kelkaj jaroj, malfacile eklaboris pere de komputiloj arigitaj en lokajn retojn. Nun ili pli kaj pli ofte internaciigxas kaj aliras la reton... Cxu esperantistoj malfruu?

Sur la reto, ni jam posedas ejon

por propagandi pri esperanto kaj informi la membrojn de *Senlime* pri ties vivado kaj agado. Ni disvolvu tiun estontecplenan ilon.

Mi proponas unue, ke cxiuj membroj, kiuj disponas pri retaliro, estu (ekde la jaro 2000) senpage membroj de *Senlime*, kondicxe, ke ili efektive komuniku per tiu rimedo (tiu-cxi informilo, ekzemple, ekzistus nur kiel papera kopio de ret-pagxo kaj ne estus sendota al ret-anoj).

Por plifaciligi la estradon de la asocio, la komitatanoj estu rete konektitaj. Tial ili ricevu helpon (materian, financon,...) en 1999.

Sur la reto jam ekzistas ekzemplo de tia organizado: la ejo nomita "Jointplanning" senpage ebligas al grupoj havi komunan virtualan agendon, memorigilon kaj adreslibron, disponi pri loko kie stoki diversajn dosierojn kaj informojn alireblajn de cxiuj membroj (nuntempe gxis "5 Mb").

Eblas tiel konversacii sur la reto, intersxangxi mesagxojn kaj tekstojn (adresarojn, kontojn,...), ecx ekzemple vocxdoni pri difinita propono. Mallonge dirite, eblas fari komitatkunvenon sur la reto, eble pli efike ol en reala loko...

Tia sistemo igxus absolute necesa se ni volus efektive kunlabori kun aliaj grupoj similaj (do foraj) al *Senlime*. Mi ankaux imagas, ke la komitatanoj de UEA (kiel de aliaj mondaj asocioj) tirus grandajn avantaĝojn de tia sistemo...

J.- M. Jacques

E S enlime p e r a n t o

Celante plifortigi la interpopolan interkomprenigxon, helpe de la internacia lignvo esperanto, precipe en la Euxregiono Mozo-Rejno, *Senlime* publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxo en la Euxregiono.

Gxi eventuale povas enhavi la programerojn de la lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxo (aliaj ekzistas !).

Rappel / rememorigo:

Pagxo / Pages **E.G.V.-Senlime**
 cxe / sur Internet:

<http://www.ping.be/jmjsenlime>

Inf.: J.-M. JACQUES

(xx 32 87/33.02.92

: jmjsenlime@ping.be

Eùregiona kalendaro 1998/99 (2)

Vendredon, la 13an kaj sabaton, la 14an de novembro 1998 - 9h00 gxis 17h00 - Charleroi (B): Esperanto-Budo okaze de la **L i n g v a F o i r o**. Ejo: Boato sur Sambro. Sekretariejo: Kinejo PARADIZO, Place Buisset, Charleroi (apud stacidomo Charleroi Sud-a). Inf. Marcel DELFORGE: (xx-32-71/43.14.13 : apesp@infonie.be.

Vendredon, la 27an de novembro 1998 - 20h00 - Kelmis (B) - prelego de Raymond DEMARCHE: "*Kiom belas nia regiono*" (kun lumbildoj). Ejo: **Park-Kafejo**, rue des Carabiniers 2, Kelmis. Inf. cxe Jean-Marie JACQUES (xx 32-87/33.02.92 : jmjsenlime@ping.be N-B: tiu prelego estas sekvota de dua parto (dato jam ne fiksita...).

Sabaton, la 12an de decembro 1998 - 18h00 - Kelmis (B): dua Trilanda Zamenhof-festo de *Senlime*. Ejo: **Park-Kafejo**, rue des Carabiniers 2, Kelmis. Inf. kaj deviga antaux-rezervado (prezo: 600 BEF sen trinkajxo) cxe Trude SINNO (xx 31 43/3062015 : sinno@ibac.rwth-aachen.de.

Vendredon, la 19an de februaro 1999 - 20h00 - Kelmis (B): komuna grupvespero de *Senlime* (*ricxigu vian vortrezoron* per lingvaj ekzercoj helpe de S-ro Mathieu SCHRYMECKER). Ejo: SELECT Lutlicherstr. 264 à Park-kafejo. Inf. Trude SINNO: (xx 31 43/3062015

: sinno@ibac.rwth-aachen.de.
 * Dimanxon, la 28an de februaro 1999 - 14h00 - Kelmis (B): komitat-kunveno de *Senlime* (**nur por komitatanoj kaj invititoj**). Inf. Trude SINNO: (xx 31 4330/62015 : sinno@ibac.rwth-aachen.de.

Dimanxon, la 21an de marto 1999 - 10h00 - Stolberg (D): trilanda renkontigxo de *Senlime* (prelegoj de Sino DRECKMEYER kaj S-ro Yves PERAUT, vizito de muzeo, film-prezentado, gxenerala asembleo de *Senlime*, ...). Antauxvidebla prezo: 50 DEM (45 DEM por membroj). Inf. kaj deviga aligxilo cxe Klaus HOGEN: (xx 49 2406 7809 : Hogen@t-online.de.

Sabaton, la 27an de junio 1999 - 10h00 - Huizingen (B): APE-pikniko. Inf. Marcel DELFORGE (xx-32-71 / 43.14.13. : apesp@infonie.be.

* Julio - auxgusto 1999: somera pauxzo (pro la feria periodo, ni ne kunvenos en Kelmis).

31 julio - 7 auxgusto: 84-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en BERLINO. Inf. Marcel DELFORGE (xx-32-71 / 43.14.13. e-mail: apesp@infonie.be.

!

Pro eblaj programxangxo, prefere telefonu cxe la menciita persono antaù ol partopreni aktivajxon.

Komuna kunveno en Park Cafe, Schuetzenstr. 2,
Kelmis, la 12an de decembro je la 18a horo :

“Zamenhof-festo”

Senlime

*invitas vin al la
dua Zamenhoffesto*

en

Kelmis / La Calamine

la 12-an de decembro 1998.

Akcepto ek de la 18-a horo.



Le 12 décembre à 20
heures, au “*Parc-café*” à
La Calamine, les
espérantistes des trois pays
voisins se retrouveront
pour se remémorer la
naissance de l’auteur de
leur langue, lors de la
traditionnelle
“*Zamenhof-festo*”

Pro transform-laboroj, nia bela pasinjara solono en “Select” ne disponeblas en novembro kaj decembro. Mathieu Schrymecker sercxis alian lokojn kaj ricevis favoran ofertan de Parc-Cafe, kaj por la komuna grupvespero la 27-an de novembro, kaj por la Zamenhoffesto la 12-an de decembro.

Por la prelego ni ricevos saloneton en la unua etagxo, kondicxe ke ni konsumu po 2 trinkajxojn.

Por nia festa arangxo eblos ricevi treege belan restoracian cxambron (aux kamencxambro aux plantejo kun ekzotaj plantejoj), kondicxe ke ni cxuij elektu ununuran komunan mangxajxon (kun vegetara alternativo).

MENUO

Kressupo



Fileo de meleagro en drakunkola saunco

Sezonaj legomoj

Terpomoj (laux elekto)



(vegetara legomtorto alternative)



*Glaciajvo aux bakitaj vanilkuketoj
elekteblaj.*

**Ni atendas vian konfirmon kun
magxajxelekto gxis la 30-a de
novembro cxe**

Senlime(T. Sinno)

In't Oord 45
NL-6291 VN Vaals

Tel xx31-43-3062015.

La tuto estas servota luksstile kun sxtoftablotukoj, flor-dekoracio ktp., en vere bela kadro. La prezoj en cxi tiu restoracio gxenerale estas altaj, sed la estro akceptus por la supra arangxo nurajn Bfr. 600 (DM 30.- Hfl 33.-). Trinkajxoj aldonigxus.

Ni provizore mendis por 20 personoj kun ebleco de altigxo al 30-35 personoj.

La salono, pro la festa atmosfero kaj la largxeco, ne tauxgas por granda aldona programo. Cxifoje kiel pasintjare, la komitato opinias ke la bona mangxajxo estu la cxefa ero.

Aldoneblus ekzemple mallongan festparoladon, deklamon de poemoj, legadon de rakonto aux alia teksto, anekdotojn, sxercojn, kantadon, kaj lauxeble lotumadon (por tio ni kolektu donacetojn).

Invititaj estas ankaŭ, krom niaj cxelimaj (Marnolandaj, Akenaj kaj Verviersaj) membroj kaj gepartneroj, aliaj (novaj kaj malnovaj) interesuloj pli foraj...

Konkretajxojn ni povus pridiskuti dum la komuna grupvespero, la 27-an de novembro. Bonvolu pripensi la supran planon kaj aldoni viajn ideojn, sugestojn, konfirmon.

Por la komitato,
T. Sinno

PROTOKOLO

PRI LA LASTA KOMITAT-KUNSIDO OKAZINTA LA 25an de oktobro 1998 en Kelmis

Cxeestis:

S-roj Wolfgang BIENEN, Marcel DELFORGE, Claus HOGEN, Jean-Marie JACQUES, Heinrich LENTZEN, S-inoj Trude SINNO kaj Anne-Liese SOUREN.

Invitito:

S-ro Mathieu SCHRYMECKER.

Senkulpigxis:

S-ro Klaus GUENKEL.

Prezidis:

S-ro Marcel DELFORGE.

1. Protokolo pri la antauxa kunveno estas unuanime aprobata.

2. Trilanda Renkontigxo en Dinant (fina analizo)

Kvindeko da personoj aligxis (plejparte por la du tagoj). La antauxvidita programo definitivigxis. Akcepto oficiala en la urbo-domo ne estis organizebla dimancxe, tamen vizito de la urbo-domo jes ja okazis, dank'al sindonemo de S-ro DELFORGE kaj lia familio, kiujn ni ege dankas.

Finance, la rezulto estas profito da 1500 BEF por APE kaj *Senlime*. APE do sxuldas 750 BEF al *Senlime*, kiujn gxi pagos okaze de venonta Trilanda Renkontigxo.

Multaj kritikoj estas ricevitaj:

- distancoj inter la diversaj eventejoj tro grandaj ;
- mangxoj nebonaj, nesuficxaj kaj nevariitaj ;
- akcepto far' la urbestro ne okazis ;
- pag-problemoj (sistemo ne kutima sed repago farita, cxio fine en ordo);
- tamen, logxejo bona kaj reagoj tre taugaj de S-ro DELFORGE por savi la aferon...

3. Aktuala membro-listo,...

Post diskuto, la komitato decidis ne sxangxi la antauxan pagsistemon, sed plibonigi gxin, unue pli regule informante la adresaran responsanton (S-ron LENTZEN).

Tiu-cxi ankaux rapide transsendu la informojn al la komitatoj (necesajn por la sendado de la informilo, la kontrolo de la pagoj okaze de TLR, la kontregistado far' Claus HOGEN, k.t.p.).

Komitatoj ankaux tuj sendu al S-ro LENTZEN la nomojn kaj adresojn de cxiuj novaj interesigxantoj pri esperanto aux *Senlime* (ecx se ili jam ne pagis kotizon...).

4. Estonteco de Senlime

Senlime ja estas grava loka grupo en trilingva Euxregiono : gxi do agu, ("rekte, kuragxe kaj neflankigxante"), konsekvence, malgraux malfacilajxoj (personaj konfliktoj, lokaj problemoj: ekz-e sxangxoj kaj provizora fermo de la kultur-centro SELECT).

Programo por la unuaj monatoj de 1999 estas skizita (vidu la agendon).

5. Trilanda Renkontigxo en Stolberg (D) - 1999/03/21 (raporto de K. HOGEN)

Provizora programo:

10h00 malfermo de la akceptejo (kulturcentro)
10h45 prelego de S-ino DRECKMEYER
11h15 foriro al muzeo pri zinko kaj kudrilo

Dauxrigo sur la pagxo 6

Le 25 octobre à 14 heures, au "*Select*" à La Calamine, le comité de *Senlime* s'est réuni pour préparer le programme des activités futures de l'association.

Après avoir évalué les résultats de la précédente rencontre des espérantistes des trois pays à Dinant, il a préparé la rencontre suivante, qui aura lieu en Allemagne (Stolberg).

Il s'est également penché sur divers problèmes d'organisation et sur l'avenir du mouvement dans l'Eurégion Meuse-Rhin.

Verviersa
Esperanto-Grupo
Cotisations

Les belges habitant l'Eurégion peuvent virer les cotisations suivantes au compte n°

000-0245571-64

de: Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

APE 1998-99	400 BEF
UEA 1998	1900 BEF
SENLIME 99	370 BEF

Senlime

— *Senlime : Membro-identigilo*

Dauxrigo de la pagxo 5

11h30 vizito de la muzeo: du grupoj
- zinko far' S-ro LANGENBACH,
- kudrilo far' S-ro SPIELVOGEL.
13h15 Tagmangxo
14h45 Reiro al kulturcentro
15h15 Prelego de S-ro Yves
PERAUT (SAT-ano) pri aspektoj
de laborado (en rilato kun la muzea
enhavo).
16h00 Film-prezentado
16h30 Kafo, kuko
17h00 Gxenerala Asembleo
17h45 Adiauxo.

Antauxvidita kosto: 45,89 DEM.
Antauxviditaj prezoj: 50 DEM
(45 DEM se rabato).

Reklamo: eblos ricevi helpon de
urbaj varbistoj por afisxa gluado kaj
gazeta materialo.

La bugxeto (elspezoj) estos
proksimume 1800 DEM (por 40
partoprenantoj). La Grupo de
Verviers antauxe gxiru tiun sumon
al la Rondo de Akeno, el la havajxo
de *Senlime* en Belgujo.

6. Zamenhof-festo en Kelmis

Dua Zamenhof-festo okazos la 12an
de decembro en Kelmis (Park-
kafejo, pro transform-laboroj en
S e l e c t) .
Kadre de bona vespermangxo,
programeretoj estas antauxviditaj:
pianludado far' Claus HOGEN,
kunkantado, skecxo(j), poem-
legado,....

7. Aktivado de Senlime kadre de la Berlin-a kongreso

Ni antauxvidas nur disdonon de
esperantlingva informilo pri
"Senlime" (teksto cxerpita el nia
TTT-ejo).

8. Varbado

Diversaj gazetoj senpage uzeblas :

- en NL : "De Vondst"
- en DE : "Annonce"
- en BE : "Les Echos",...

Ni uzu nian monon por acxeti
propagandilojn, perkorespondajn
kursojn,...

9. Sekvonta laborkunsido

28an de februaro je la 14a horo en
Select (aux Park-Kafejo), Kelmis.

10. Diversajxo

Premiere en Belgio : "Esperanto"
far' Semola teatro de warande,
Warandestraat 42, B-2300
TURNHOUT (1999/10/28-10/29-
20h15).

S-ro LENTZEN pretas helpi S-ron
JACQUES pri tajpado de la
informilo (de) *Senlime*.
FLEJA organizos feston sude de
Maastricht (*Cxieltage*, 13-16 majo
1999).

JEVA sercxas novan responsulon.

Kadre de film-semajno en Akeno :
La eta knabino aux kiel oni trovas
ian helpon.

Televida elsendo pri esperanto
okazos el Nederlando (VPR I), la
8an de novembro je la 21a horo.

11. Venonta Trilanda Renkontigxo

Gxi devus okazi, en auxuno 1999,
en NL (pro antauxaj fushajxo). En
kazo kiam Marnoland-grupo nenion
farus, cxuij komitatanoj pripensu
kion fari, por la venonta kunsido.

La protokolinto,
J.- M. Jacques

N'oubliez pas notre site Internet
(même si vous n'êtes pas branché,
vous pouvez le visiter dans un
cybercafé, un centre culturel, chez
un copain,...).

Merci de votre visite !

<http://www.galaxycorp.com/>
JMJacques